

NORDA ★ KURIERO

Norda Francio festis Zamenhofon lude



La Nordfrancia Esperanto-Federacio kaj la Lilla klubo organizis Zamenhof-feston en sabato la 15^a de decembro 2018 posttagmeze en Lillo (MRES). Partoprenis el la regiono trideko da esperantistoj, inkluzive de pluraj novaj junuloj.

La momento estis plej bonetosa dank' al la babiloj, kukoj kaj trinkaĵoj, sed aparte dank' al diversaj ludoj. Ja la temo de tiu renkontiĝo estis: "Ludoj!"

Kelkaj festantoj kunportis kartoludojn. Michel Dechy depruntis de la mediateko de Villeneuve-d'Ascq plurajn lignajn ludojn, kiuj tiel bone distris niajn nordfranciajn geavojn. Ĉiuj prezentitaj ludoj furoris inter la partoprenantoj!

La festo finiĝis vespere en la kurda restoracio Yol, kie la samtablanoj tostis je la memoro de Zamenhof!

Kunsidis la Federacia Komitato

La Komitato de la Nordfrancia Federacio kunsidis en Lillo sabaton la 15^{an} de decembro 2018 antaŭ la Zamenhof-festo. La kunsido prezidata de Michel Dechy naskis plurajn decidojn.

Interasocia kotizosistemo

La komitatanoj diskutis pri la interasocia kotizo aplikata en la Federacio kaj ĝiaj membraj kluboj ekde septembro 2018. Ĉiuj konfirmis la intereson de tiu sistemo, malgraŭ kelkaj problemoj solvendaj.


Necesas, ke la klubestroj atentigu siajn membrojn kaj lernantojn por (re)membraĝi nur per la interasocia kotizosistemo. La klubaj prezidantoj kaj kasistoj povos viziti specialan retpaĝon de la landa asocio Esperanto France (UFE) por konstati la membraĝojn kaj zorgi pri la kotizmono kolektita de UFE.

Materialo por Esperanto-budo

Okaze de la Lilla Universala Kongreso (UK) de Esperanto en 2015 UFE farigis novan, belaspektan materialon por Esperanto-budo, desegnitajn de Bruno Flochon.

Ĝi konsistas el teksta budomuro (300 €) kaj tableto (250 €) videblaj en la ĉi-suba foto de la ĵurnalo *La Voix du Nord*, kiu raportis pri la UK.

La Federacio decidis monhelpi la membrajn klubojn, kiuj volos akiri tiun materialon, ĝis duono de la prezoj.



La regiona movado en Interreto

Xavier Dewidehem rimarkigis, ke nuntempe ekzistas retejoj kaj Facebook-paĝoj* de la Federacio kaj la kluboj, kaj ke pluraj retejoj ne plu estas ĝisdatigitaj. Tiuj komunikiloj postulas tempon, dum mankas homfortoj sur tiu kampo. Necesus aktualigi la farmanierojn de la nordfrancia movado.

Tial la Federacio proponas al la membraj kluboj kunfandi ĉiujn retejojn kaj Facebook-paĝojn de la Federacio kaj la kluboj en unusolan retejon kaj unusolan Facebook-paĝon kun pluraj kontribuantoj. Tiu propono estas debatinda ene de la kluboj kaj de la venontaj federaciaj kunvenoj.



* Retejon havas la Federacio kaj la kluboj de Araso, Dunkirko, Lillo kaj Valencieno (iam ankaŭ Amieno). Paĝon en Facebook havas la kluboj de Dunkirko kaj Lillo.

Forpasis urbestro Michel Bouchez

Kun bedaŭro ni eksciis la forpason de Michel Bouchez la 13^{an} de decembro 2018 je la aĝo de 81 jaroj. Li lernis Esperanton en 1976 por familia vojaĝo en Pollandon. La facileco de la lingvo kaj tiu pola sperto tre entuziasmigis lin, kiu poste kreis Esperanto-klubon en sia urbo Fouquières-lez-Lens.

Li estis elektita urbestro de sia urbo en 1989, kaj tie akceptis la internacian Esperanto-kongreson de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en 2001. En ĉi tiu jaro lia filo Boris kun sia edzino Véronique vojaĝis en Esperanto tra la mondo.

Ni kondolencas la familion de Michel kaj plu memoros lin kiel fervoran esperantiston.



En aprilo ni kongresu en Dovro!



Ĉi-jare nia landa asocio *Espéranto France* kaj la Brita Esperanto-Asocio decidis organizi komunan kongreson en Dovro de vendredo la 12^a ĝis lundo la 16^a de aprilo 2019!

Ambaŭ asocioj elektis la urbon Dovro, ĉar en 1904 okazis la vere unua internacia renkontiĝo de esperantistoj proksime, nome en Kalezo.

Dum la kongreso vi povos (re)malkovri la urbojn

Dovro kaj Kalezo, aŭskulti la koncerton de Martin Wiese kaj danci dum la tradicia kelta dancado t.n. *ceilidh*.

Ni instigas vin partopreni tiun dulandan kongreson kaj ĝui internacian kaj amikecan etoson bordere de nia propra regiono!

Informiĝu kaj aliĝu vizitante la kongresan retejon:
www.britakongreso.org

Bona humoro en la Bersea klubo



La Bersea* Esperanto-klubo kunvenas ĉiun lundon vespere en la mediateko. Dek personoj partoprenas regule la rondon, kiun Claude Longue-Épée gvidas. Li estas tre pacienca kaj ĉiam bonhumora. Dank' al li, ni travivas agrablan momenton.

Ĉiujare, ĝenerale antaŭ la jarfinaj festoj, ni kunvenas sed ne laboras. La edzinoj kaj la edzoj estas invititaj.

Ĉiu alportas ion por trinki aŭ por manĝi. Oni nomas tion "hispana gastejo". Estas tre agrable manĝi kune kaj multe diskuti, babili, ŝerci, ridi en bonhumora etoso!

✍ France **Valet**

* Berseo (france: *Bersée*) estas urbeto sude de Lillo. Kelkaj diras, ke pro la tiea proporcio da esperantistoj ĝi estus la ĉefurbo de Esperantujo!

Agrabla esperantumo en Germanio

Kiel ĉiujare okazis la Novjara Renkontiĝo (NR) de la 27^a de decembro ĝis la 3^a de januaro. Unuafoje ni loĝis en Wiesbaden, ne for de Frankfurto. Tiu urbo enhavas 260 000 loĝantojn, kaj preskaŭ ne estis detruita dum la dua mondmilito, eble laŭdire ĉar la usonanoj volis havi daŭran bazon tie.

Laŭlonge de multaj stratoj, fiere staras belegaj domoj, ofte konstruitaj fine de la 19^a jarcento aŭ komence de la 20^a. Wiesbaden (*Baden* = banoj) ankoraŭ estas urbo, kie per apartaj akvoj kaj flegoj oni zorgas pri diversaj sanproblemoj.

Kiel kutime, la 200 partoprenantoj ĝuis riĉajn, tre diversajn programerojn. Ĉiam agrablas la ebleco trovi amikojn kaj konatiĝi kun novaj homoj dank' al la facileco alparoli ĉiujn.

Jam estas planite reiri tien venontjare. Ĉiuj kontentas!

✍ Anne **Dupéchaud**



Ankaŭ Lucie **Mazurkiewicz** esperantumis en Germanio. Pri tio ŝi skribas:

"Mi partoprenis la aranĝon Luminesk en Germanio de la 27^a de decembro ĝis la 3^a de januaro. Ĝi okazis en Königswinter, proksime al Bonn. Partoprenis ĉirkaŭ 65-70 personoj el 8 landoj."

“La Tagordo” de Éric Vuillard


La verko *L'Ordre du jour* en la franca aperis en majo 2017 kaj la aŭtoro ricevis la plej prestiĝan literaturan premion danke al tiu verko en 2017. Post traduko kaj per kontrakto inter la originala eldonejo Actes Sud kaj la eldonejo Z4 Éditions, ĝia Esperanta versio aperis en oktobro 2018. Mi dankas la eldoniston Daniel Ziv: sen li, ne eblis tiun publikigon realigi.

Kial tiu laboro estas grava por nia movado ?

Unue, ni kontaktis Actes Sud kaj la aŭtoron por peti konsenton pri la realigo kaj publikigo, kaj ili konsentis. Plie, laŭ mia eldonisto, la kontrakto estas tre interesa, t.e. ne tro multekosta por eldoni en Esperanto. Kaj tiel Actes Sud scias, ke Esperanto ekzistas, kaj ke eblas traduki librojn en tiun lingvon...

Due, la temo estas universala. Temas pri rakonto de kelkaj flankaj eventoj antaŭ la dua mondmilito, do en la 1930^{aj} jaroj. Rakontoj nekonataj sed gravaj laŭ la aŭtoro. Kaj tiuj etaj eventoj okazas ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Brazilo antaŭ nelonge... Tiu libro ebligas pripensi pri niaj voĉdonoj ĉie en la mondo. Antaŭ meto de voĉdonilo en urnon, necesas rememori.

Mi tradukis en du monatoj kaj kvin tagoj ekzakte. Sed poste venis la dua pli granda laboro, tio estis korekti kun miaj samklubanoj de *Espéranto* 80 kaj kun mia rusa amikino Nina Aleksandrova. Poste, venis la laboro kun la eldonisto. Por tiu traduko mi uzis multnombrajn ilojn... kaj homojn! Interalie, mi laboris per la reta ilo “Tekstaro”. Mi uzis ĉiajn vortarojn (eĉ por scii pli pri la franca!) kaj laboris kun la diversaj grupoj en Facebook, kiuj okupiĝas pri trafikaj kaj ĝustaj tradukoj, kiel “Bona Lingvo”,



kaj “Lingva Konsultejo”. Post tiu laboro, Daniel Ziv nun intencas publikigi aliajn verkojn en Esperanto... Kampo de agado riĉa, interesa, kaj, mi esperas, sukcesplena!

Vi povas rete legi la unuajn du ĉapitrojn kaj aĉeti ĉe: <https://z4editions.fr/publication/tagordo>

Esperantaj libroservoj aĉetas, do eblos ankaŭ aĉeti, kiam vi partoprenos aranĝojn internaciajn aŭ eĉ lokajn kun libroservo. *Jean-Claude Roy*

K O L O F O N O

La **Norda Kuriero** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas kvarfoje en jaro: januare, aprile, julie kaj oktobre.

Ĉefredaktas: **Katja Boen** kaj **Xavier Dewidehem**.
Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn, anoncojn, raportojn, artikolojn kaj fotojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso:

kuriero@esperanto-nord.org

ĝis la unua dimanĉo de januaro, aprilo, julio kaj oktobro.